D-ro WILLEM VANDERBIEST - Li estis la filo de Vanderbiest-Andelhof, prezidanto de "Belga Ligo". De li aperis "Amours Espérantistes, vaudeville en 1 acte"(I9I0) "Kaatje" 4-akta teatraĵo de Paul Spaak(I9I0) sursceniigita dum la U.K. en Antverpeno, same kun lia originala "(1-akta) Revuo de la Sepo"(I9II); originala monologo "Ŝi ne legos ĝin", "La Amuzistoj" 4-akta teatraĵo de Michel Zamaicos(I9I4) kaj "Bietje"(Binjo) 1-akta teatraĵeto de Maurits Sabbe(I9I4) Li estis sekretario-kasisto de la U.K. en Antverpeno(I9I1) Dum la 1-a mondmilito li multe helpis la belgajn elmingrintojn en Anglujo. Post la morto de lia unua edzino li revenis Belgujon kie li, en Bruselo, forlasis la praktikon de la kuracarto por iĝi ĵurnalisto ĉe flandra ĵurnalo, estis prezidanto de la Brusela Grupo kaj mortis en I936.